

"Floroj por leprulo" de Boris Pahor - Libro de Anita Periĉ Altherr
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.09.26

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. "Ne facilas esti...sloveno en Italio" estas la titolo de ĵus aperinta libro, kiu memorigas, ke ne nur en Slovenio estas parolata la slovena, sed ankaŭ en la najbara Italio. Enkonduke al la recenzo de tiu tre aktuala libro de Anita Periĉ Altherr, ni legos al vi hodiaŭ kelkajn fragmentojn el novelo de Boris Pahor, inspirita de fakto okazinta en 1936 en la vilaĝo Podgora, kiam la faŝismo malpermesis la uzon de la slovena kaj incitis al la murdo de la malobeantoj.

Cl.- Jen do kelkaj fragmentoj el sufiĉe longa novelo titolita "Floroj por leprulo" de Boris Pahor:

A.- La vilaĝeto kaŭrkuŝis silente kaj absorbe piede de la monto Sabotin, kvazaŭ ĝi apogus dorson ĉe muro por sin konvene defendi de agresonto. Lante kaj senindulge densiĝis krepusko sur ĝi kaj sur la preĝejturo...

Cl.- En la ĥorejo la knabinoj en siaj buntaj vestoj similis fajron de geranioj florantaj sur fenestra sojlo de griza kampardomo. "Mallaŭte, sed vigle" li diris.

A.- La knabinoj kantis pri la arbareto reverdiĝinta, pri la plenflora herbejo.

Cl.- "Ankoraŭ pli mallaŭte" li diris.

A.- Post kiam lia voĉo leviĝis, la knabinoj ekmotis kaj fiksrigardis lin. Ŝajnis ke la vandoj de la eta sanktejo malfermiĝas kaj ke la knabinĥoro ne plu estas tie, sed troviĝas meze de la gorica ebenaĵo...

Cl.- Li ridetis. "Vi ja ne lasos min kanti sola!" li aplombis ŝerce.

A.- Ankaŭ la knabinoj ridetis kaj interŝanĝis palpebruman rigardon...

Cl.- Ili estis tutsimple knabinoj lernantaj malpermesitajn kantojn, tiujn kantitajn de iliaj avinoj...

A.- Sub la ĥorejo estis du vicoj da maljunuletoj nuk-kline genuiĝintaj sur la benkoj: jen ordo rigida kaj firmaj kiel la neŝanĝebla ordo de la Kalvaria Vojo sur la vandoj: serio da dekkvar stacioj sinsekvaj ĉirkaŭe, kie finiĝis la lasta, komenciĝis la unua. En ĉiu stacio la samaj romiaj soldatoj. Rigidaj kaj indiferentaj ili fikse tenis enmane lancojn kaj glavojn, kun glacia esprimo pli tranĉa ol klingo.

Cl.- "Pli verve, pli verve" li ekkriis.

A.- Sed la knabinoj silentis.

Cl.- La malnova malfirma planko krakbruis: la lignaj tabuloj cedis sub paŝoj de du viroj, kiuj nun troviĝis en la ĥorejo, kvazaŭ ili estus elirintaj el soldata centurio de la Kalvari-voja bildo proksima de la korusejo. Du viroj survestantaj nigran ĉemizon. "Luigi Bratuz", diris unu.

A.- La knabinoj timigitaj ekstrems, kiel infanoj kiuj songas pri la diablo, kiel birdoj atakitaj de akcipitro, dum la harmoniumo malrapide resuĉadis la sonojn disŝiritajn, rigidiĝinte kaj malmoliĝinte, kiaj estis la benkoj sur la ĥorejo.

Cl.- "Estas mi", li diris, ekstariĝinte.

A.- Dum oni forkondukis lin, la sanktejo ankoraŭ odoris je incenco, sed la vilaĝo estis muta, kiel droninto, kiun la rivero Soĉa sursablen alborderis...

Cl.- "Trinku, kanajlo !" diris la viro en nigra ĉemizo, Survande pendis lada horloĝo blanke farbita, similaspekta je tiuj de antaŭurbaj kafejoj, sed surtable staris glasego de unu litro da flaveca likvaĵo.

A.- Dua milicano tiam ekkaptis la glason: "Trinku!"

Cl.- "Komprenite?" diris tiu kiu enmane tenis pafilon. La miliciano, kiu staris ĉe la fenestro manenpoŝe de siaj pantalonej, mokŝercis: "Lubrikos al vi la gorĝon, tiel vi povos pli bone kanti !"

A.- Li perceptis abomenon, kiom povas naŭzi densa kaj oleeca likvaĵo al uvulo, kiu estas fonto de kanto kaj de homa spiro. Plie la flava englasa oleo estis ŝmiroleo por maŝinoj; ĝi arabeskis komplikajn violbluajn desegnaĵojn.

Cl.- "Rapidus vi ĉu? aŭ ne?" diris la nigraĉemizulo.

A.- Li estis muta, tenanta per la mano la unulitran glason. Li tenis ĝin per sia dekstra mano antaŭ sia brusto, kiu estis larĝa kiel lia honesteco. Estis la sana torako de l'alpisto, kies voĉo povas tremigi la krutaĵojn... kaj nun ĉenita en ĉi-policeja kamero. Ne pro sia neniigo li timis, sed li estis atakita de nekredebla, profunda tristo je la penso, ke li devas propramane sufoki la kanton en si mem kaj estingi la ardon, kiel patrino, kiu streĉas la zonon por mortpremi la infanon en sia propra ventro. Tiam li aŭtomate ektrinkis kaj per imago li aŭskultadis la knabinojn finkanti la kanton de la arbareto ree verdiĝonta, sed ne por li. Li trinkis. La densa malpuraĵo plenigis lian gorĝon, dume la kamero obskuriĝis kaj mallargiĝis antaŭ liaj okuloj...

Cl.- Dum li kuŝis en hospitalo, la tuta regiono anhelspiris, samkiel lia brusto. Mortiga frostoj falis sur la montajn deklivojn, sur la kampojn de la ebenaĵo, penetris la kelojn. La homoj haltadis sur la trotuaroj, per rigardoj ili reciprokis enketsignojn, silenta ĉagreno penetris ilin, kvazaŭ morto estus malferminta large la pordojn de ĉiuj slovenaj domoj... La paŝtistoj deprenis la sonorilojn de la ŝafoj... "ho!" li lamentis.

A.- "Lojze, Lojze, aŭskultu!"

Cl.- Sed li ne aŭdis ŝin. Tial ŝi alklinis sin, apogis sian frunton sur lian kapkusenon kaj ploris. Ŝi estis sola en la hospitala ĉambreto: antaŭ kies pordo garde staris policisto.

A.- Tiu, kiu... sukcesis ŝtele eniri la tombejon, povis de malproksime vidi solecan tombon kun apudstaranta gardisto. Sed li povis ankaŭ vidi, ke sur ĝi kuŝis monto-aspekta amaso da floroj. Multaj floroj. Floraro, kiu atingis la randojn de la ĉirkaŭaj tomboj. Malgraŭ la revolveroj kaj pafiloj, tie staris piramido da florkronoj kaj florbukedoj. Sed ĝia aspekto estis ŝton- au lignamasa, ĉar la floroj estis ĵetitaj al li pelmele, kaŝe trans la tombeja muro de malproksime, kvazaŭ li estus leprulo.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND recenzos la libron "Ne facilas esti sloveno en Italio" de Anita Perič Altherr, el kiu estis ĉerpitaj la fragmentoj el la novelo "Floroj por leprulo" de la sloven-itala verkisto Boris Pahor. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*